Voorafgaand aan het interview vertellen Pieter en ik aan Han over het Esperanto. Han vraagt of het inderdaad veel gemakkelijker te leren is dan bijvoorbeeld Engels. Wij leggen uit dat het Esperanto inderdaad gemakkelijker te leren is, onder meer omdat er geen uitzonderingen zijn en de woorden worden opgebouwd uit woordstammen en voor- en achtervoegsels. Pieter zal voor Bonvenon een stukje schrijven over het Esperanto, zodat de stichting dat kan opnemen in haar informatiemateriaal.

keuze vertelde, konden de anderen zich direct in deze keuze vinden. Zij wisten wat Esperanto was, hoewel mogelijk niet precies.

Han spreekt het Esperanto niet. Hij kende de taal wel doordat zijn vader geïnteresseerd was in talen en zich ook in het Esperanto verdiepte. Of die het Esperanto kon lezen of sprak, dat weet Han niet. Thuis lag in de jaren zestig het talenblad Lectura op tafel. Daarin stonden verhalen in meerdere talen, Engels, Frans, en in Han zijn herinnering ook in het Esperanto.

Aan het eind van het interview wil Han de lezers van Fenikso nog meegeven dat hij hoopt dat zij er bewust van blijven dat Esperanto meer is dan alleen een taal. Het is een taal die verbindt.

### *Kurta poemo pri pito kaj turpo*

*serĉu veron en stranga revo,  
ŝatu grandon en griza pito,  
konu bonon en fia ĉifono,  
aprezu puron en ruba turpo,  
esploru pion en olda mito*

Frans Cobben, Nederlando, oktobro 2020

## The following program is in Esperanto

"la sekva programo estas en Esperanto. [...] Nun estas la unua posttagmeze. Lundo, la dek sesa de novembro 2020. Vi aŭskultas elsendon en Esperanto preparitan kaj prezentitan de Matt kaj Franciska. Aŭstralio estas enkalkulata en la riĉaj landoj. Sed tio tute ne signifas ke ĉiuj aŭstralianoj estaj riĉaj. Fakte jam en 2018 unu infano el kvin iris al la lernejo sen matenmanĝo. Tri milionoj kaj duono el la loĝantaro de dudek kvin milionoj vivas en malriĉeco."



Tiel komenciĝis unu el la elsendoj de **Radio 3zzz**, radiostacio kiu en Melbourn estas aŭskultebla per kutima fm-radio. Ili elsendas en multaj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto. Ne-aŭstralianoj povas aŭskulti tiun radiostacion per intereto kaj per iFono aŭ certe ankaŭ per aliaj samspecaj telefonoj. Antaŭe, kiam la kronviruso ankoraŭ ne troviĝis sur la tero, la skipo de la Esperanto-programo konsistis el pli da personoj, kiuj en la studio prezentis la programon. Sed nun Franciska kaj Matt kune devas plenumi tiun taskon. Ili devas fari tion hejme, kaj tio bedaŭrinde, sed kompreneble, malbonigas la sonkvaliton de la elsendoj. Sed plej gravas la enhavo de la elsendoj. Oni ekz. foje aŭdigis intervjuon pri la historio de la periodaĵo *Monato* kaj oni voĉlegis artikolojn el diversaj paperaj kaj retaj revuoj, ekz. *Turka Stelo* kaj *Esperanta Ligilo*. Se vi ŝatas muzikon, vi estas ĉe radio 3zzz ĉe konvena

stacio, ĉar aŭdiĝas diversaj esperantlingvaj muzikaĵoj de ekz. *Persone*. Foje Matt aŭdigis kanton de la nederlanda ĥoro *Akordo* dirante: "kiam mi aŭdis ĉi tiun muzikon mi tuj enamiĝis en la lingvon Esperanto." Nekredeble, kia bonega komplimento por la gekantistoj de *Akordo*, ĉu ne.

Restas al mi ankoraŭ sciigi al vi kiel vi povas aŭskulti tiujn por Esperantujo valorajn kaj reagindajn programojn. Ĉar, nepre montru al ili vian opinion pri la aŭditaj programoj. [www.3zzz.com.au](http://www.3zzz.com.au). Retpoŝtadreso: [3zzzesperanto@gmail.com](mailto:3zzzesperanto@gmail.com).

*Jos Wichmann*

*N.B. En la elsendo numero 309, la elsendo de la 7-a de decembro 2020, vi povis aŭskulti la ĥoron Akordo.*



## Saluton Mondo ĉe Kanal8618

**Ekde la 7-a de novembro 2020 ĉiun duan sabaton Svislando havas Esperanto-radio-programon ĉe radio Kanal8610 je 16:00 (ripeto je 19:00).**

La programo konsistas el 7-minuta Esperanto-kurso por germanlingvanoj, kiun sekvas, post muzika paŭzo, kultura elsendo kun intervjuoj, libroprezentaĵoj kaj novaĵoj el Esperantujo kaj Svislando. Al Kanal8610: [www.kanal8610.org](http://www.kanal8610.org)  
Rekte al la Esperanto-elsendoj: <https://anchor.fm/dietrich-michael-weidmann>

*Kun amikaj salutoj  
Dietrich Michael Weidmann*



## Nova infanlibreto en diversaj lingvoj

En la mezo de oktobro 2020 aperis en Esperanto nova infanbildlibreto. Ĝin desegnis kaj nederlande verkis Ronald Leunissen, instru-konsilisto por la edukado pri dentistoj ĉe la universitato de Nimego. Malgraŭ tute alia profesio, Leunissen komencis verki rakontojn pro la tiel nomata "Ĉiutagaj Kreigaj Taskoj" de DS106 (DS = Digital Storytelling), kio estas kurso de Usonaj universitatoj por lernigi studentojn krei proprajn (artajn) kreaĵojn en tute cifereca medio. Ĉiu ajn povas partopreni, do la interesitoj iru al <https://ds106.us>



"Inspiro por la rakontoj venas al mi spontanee," klarigas Leunissen. "Ĉio ajn povas venigi la unuan ideon. Desegnaĵo, rimarko, io okazanta." Dum la pasintaj jaroj li jam verkis diversajn bildlibrojn cele al junaj infanoj. Lia plej freŝa rakonto temas pri ĉarma ĝirafo Bib, kiu pro tro entuziasma kurado batas sian kapon kontraŭ branĉon (intrigmalkaŝo: ĝi fine fartos bone!). Tial la bildlibreto portas la taŭgan titolon "Bib batas al si la kapon". Leunissen, kiu nur hobia verkas, plu klarigas, "La rakonton pri Bib mi elpensis, ĉar mi volis verki rakonton por etuloj [peuters/kleuters], kaj ĉar la plej ŝatata besto de mia plej juna vicfilino estas ĝirafo. Ĝi do estu 'malgranda' kaj proksima al infana sperto. Ankaŭ la desegnaĵoj entenu ion infanecan kaj ĉarman por ligiĝi kun la etuloj. La bezonata atentodaŭro ne estu tro longa."

La bildlibreto jam aperis en multaj lingvoj kaj dialektoj, interalie diversaj limburgaj dialektoj, la nimega, la frisa, sed ankaŭ en la turka, afrikansa, indonezia kaj la rusa, kaj eĉ pli! La Esperanta versio de la libreto estas havebla nur dulingve kun la nederlanda kaj Esperanto. Ekde la kronviro tempo Leunissen subite havis pli da libera tempo pro la nuliĝo de liaj aliaj hobiaj. Li jam tradukis kun kolegoj kelkajn el siaj aliaj bildlibroj en la anglan kaj la germanan. Pro tio venis al li la ideo traduk(ig)i ankaŭ la rakonton pri Bib. Dum la jaroj Leunissen akiris ampleksan kontaktaron, komence pere de DS106, kun tre diversaj gepatraj lingvoj. Liajn petojn traduki la bildlibreton ili precipe respondis jese. "Kiam mi jam havis kelkajn eŭropajn tradukojn, mi opiniis, ke mia propra dialekto (la sud-limburga) kaj la dialekto de la urbo, en kiu mi jam loĝas 40 jarojn, [Nimego] ne manku," li rakontas. "Unu afero kondukis al alia, kaj tiel fine mi alvenis ĉe Esperanto."

La desegnado kaj verkado de liaj nfanlibretoj estas por li nur hobia. Leunissen mem ankaŭ enpaŝigas ĉion. La molkovrilajn eldonojn li presigas laŭpete per Amazon, dum la malmolkovrilaj versioj estas presitaj malgrandkvante en Pollando. "Mi ne ricevas iun ajn profiton per la vendado, sed tio entute ne estas la celo," rimarkas Leunissen.

La bildlibreto (Esperante nur molkovrila) estas mendebila per Amazon: <https://www.amazon.de/-/nl/dp/B08KH2J2WL/> aŭ per la retejo de la aŭtoro: <https://ronleunissen.com/bib/bestellen/>

La tradukon faris mi, kiam tion petis Leunissen pere de Esperanto Nederland.  
*Joost Franssen*

## Aŭskulti radio-elsendojn

Estas diversaj radio-stacioj kiuj elsendas en Esperanto.

3ZZZ Radio  
Ĉina Radio Internacia  
Radio Frei  
Kernpunkto

Muzaiko  
Radio Havana Kubo  
Varsovia Vento  
Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:  
- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>  
- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)






## Notoj pri la virtuala renkontiĝo de 7a de novembro

Zoetermeer, la 25-an de novembro 2020.

Rob Groeneveld.



Okazis virtuala kunveno de Esperanto Nederland per la programo Zumo (Zoom).

La programo por la 7a de novembro estis:

- Bonvenigo
- Konatiĝi unu kun la alia
- Priparolado de la Beleidsplan 2020-25
- Temoj, ideoj kaj komunikoj:
  - Katalin Kováts parolos pri sia nova libro 'Manlibro pri instruado de Esperanto', 4-a kompletigita eldono. Ĝi aperos en decembro 2020. La libro estas 360-paĝa kaj kostos 18 eŭrojn. Enhavo i.a.: Kiel organizi lokajn Esperanto-grupojn inkluzive instru-gvidanton por helpi aliajn lerni la lingvon kaj ekzerci sin pri konversaciado, ekzemple per Esperanto-promenado kun 1,5-metra distanco unu de la alia en via urbo aŭ per Zumo aŭ Fejsbuko.
  - Informoj pri la virtuala studo-posttagmezo, la 21-an de novembro.
  - En marto 2020 ni planis Kulturan Tagon. Ĉu ni ne povus fari tiujn prelegojn per Zumo-kunveno? Ĉu eblas registri ilin por ke niaj membroj (kaj aliaj) povu aŭskulti ilin poste?
  - Kaj aliaj se ili estas
- Fermo

Inter la 13-a horo kaj la 13-a horo kaj duono okazis enkondukaj interparoloj por provi la programon Zumo.

La komenco estis je 13:30. Kiel prezidanto, malfermis **Hiddo Velsink**. Li proponis okazigi paŭzon ĉiun duonan horon. Interkonatiĝo: "Diru ion pri via fono".

Prezentis sin la ĉeestantoj: **Bert de Wit, Rob Moerbeek, Ineke Emmelkamp, Rob Groeneveld, Sandor Hideg** – el Hungario, nun loĝas en Germanio, **Andries Hovinga, Jos Wichmann, Ans Bakker-ten Hagen, Arjen-Sjoerd de Vries, Federico Gobbo, Foppe-Klaas Hovinga, Joost Franssen, Loes Demmendaal, Peter Ebenau, Ronaldo Nobel, Rodrigo** – el Argentino, nun en Italio, venos al Nederlando, **Tonnie van Kessel, Twan Gremmen, Hiddo Velsink**. Poste partoprenis **Katalin Kováts**.

La maksimuma nombro de samtempaj partoprenantoj estis 20.

Responde al demando de **Ans, Ineke** diris ke la prezidanto de Esperanto Nederland ne ĉeestas ĉar li transloĝiĝas.

**Ineke** demandis ĉu estas mesaĝoj. **Loes**: alvenis heredaĵo de 2500 eŭroj de Jen Verheijen. La heredaĵo de Wim Baris ankoraŭ ne alvenis. Sekvis diskuto pri la Strategia Plano (*Beleidsplan*), publikigita en Fenikso. **Hiddo** tradukis ĝin en Esperanton kaj montris ĝin sur la ekrano. Ĉar Esperanto Nederland estas ANBI (asocio celanta ĝeneralan utilon), publikigita strategia plano estas necesa por la venontaj jaroj. La proponita plano mencias la subtenon de Esperanto Nederland por la katedro en la Universitato de Amsterdam (UdA). La katedro estas grava ne nur por Nederlando, sed por esperantistoj en la tuta mondo. Ĝi devas esti en la strategio de UEA. Sed estas demando pri la financa subteno de UEA por la katedro; UEA estas en malfacila financa situacio. La katedro estas por la UdA ankaŭ grava por allogi studentojn al la urbo Amsterdam.



La katedro ne kostas monon al la universitato, ĉar ĝi estas privata katedro.

**Ans** faras komplimenton al la estraro pro ĝia subteno. IEI komence subtenis, sed nun Esperanto Nederland faras tion. Pro la unikeco de la katedro ni influu la estraron de UEA por subteni la katedron de 1) Interlingvistiko kaj 2) Esperanto.

**Federico:** devas esti sufiĉe da studentoj por pravigi la daŭran ekziston de la katedro.

**Loes:** la fondaĵo Middelkoop subtenas la katedron kaj la heredaĵo de Edwin Burg. Ankaŭ nederlandaj esperantistoj pagas. Homoj ekster Nederlando pretus subteni la katedron se oni atentigus ilin. Loes kontaktos Federico-n por pluparoli pri la financoj ktp.

**Rob Moerbeek:** la katedro estas grava ekzemplo por NGGE pri oficiala instruado en Nederlando.

**Andries:** eblas havi kontaktpersonojn kiuj povas helpi homojn lerni Esperanton. Promenu ekstere kaj diskutu pri Esperanto, tiam vi estos sekura (pro la koronaviruso).

**Rob Moerbeek:** tiam ili fakte estas instruistoj. La plej bonaj instruistoj igas la lernantojn mem lerni.

**Bert:** informoj pri kunvenoj aperas en Duolingo. Nun gravas interreta instruado. Ĉu eble **Katalin** povas helpi pri tio? Duolingo ne estas en la nederlanda lingvo. **Rob Groeneveld:** Duolingo faros nederlandlingvan version nur se sufiĉe da homoj petos ĝin. **Hiddo:** kiom estas sufiĉe?

### Studsemajnfinoj.

**Arjen-Sjoerd:** ni denove organizos studosemajnfinojn post la kovima (Koronviroza malsano) situacio. Lecionoj okazos per Zumo. Estos zumkunveno la 21-an de novembro, ne plu kunveno en okcidenta Amsterdamo.

**Hiddo:** ekzistas ebloj, kaj fizike, kaj en interreto. Ĉu adapti la strategian planon por pli uzi interretajn eblojn?

**Katalin:** Zumo ebligas doni taskojn al lernantoj en apartaj ĉambroj. Ankaŭ eblas ŝanĝi la grupetojn.

**Foppe-Klaas:** Ĉu la estraro bezonas helpantojn por la strategia plano?

**Loes:** Ĝi estas plano de la asocio, do de ĉiuj membroj, ne de la estraro. La estraro jam faras multe.

**Katalin** prezentas. Aperas nova, 4-a, eldono de la Manlibro pri instruado de Esperanto.

Ekestis multaj novaj aferoj: Zumo, Duolingo... La libro multe ŝanĝiĝis kaj grandiĝis. Vidu la retejon: [manlibro.ikso.net](http://manlibro.ikso.net).

Por fini estis kelkaj rimarkigoj.

**Jos:** mi reagis al (mis)prezentoj de Esperanto, kiel antaŭe faris Verloren van Themaat. Mi ankaŭ uzas Google Translate por traduki en Esperanton kaj mi trovas erarojn.

**Rob Moerbeek:** la studotago de NGGE ne okazos. **Andries:** ni bezonas novajn estraranojn. Ĉu trovi ilin en Fejsbukaj grupoj? Ekzistas pluraj tiaj grupoj en Esperanto.

**Loes:** Esperanto Nederland aĉetis Zumo-abonon. **Katalin:** eblas uzi Zumon por aranĝi multajn kunvenojn. Alia gastiganto ('host') povas transpreni kunvenon de la unua gastiganto kaj la unua gastiganto povos forlasi la kunvenon.

**Bert:** sendu tion kion vi scias pri Zumo al mi. **Katalin:** mi instruos vin pri la uzo de Zumo.

**Ineke** dankas al **Hiddo** kaj **Bert** pro ilia laboro por sukcesa virtuala kunveno.

**Hiddo** fermas la kunvenon je la 16:25a horo.

*Zoetermeer, la 25-an de novembro 2020.  
Rob Groeneveld.*

## Een vraag uit nieuwsgierigheid

... of om zomaar eens even bij stil te staan.

Hoe is dat? Komen de grondwetten in Europa met elkaar overeen of zijn er ook conflicten tussen de grondwetten onderling? En bestaat er eigenlijk een Esperanto-vertaling van de Nederlandse Grondwet?

*Alfonso Pijnacker*

*Wilt u hier op reageren, stuur dan een mailtje naar [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl).*





## Kelkaj vortoj de NGGE

**NGGE, Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto, deziras al ĉiuj sukcesan instru- kaj informjaron 2021!**

Pro monmanko ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) proponis elekton inter savrimedoj. Nun ĝia komitato decidis altigi la kotizon al 25 eŭroj ĉe papera IPR (Internacia Pedagogia Revuo), aŭ 12,50 kun reta IPR. NGGE mem restas modeste ĉe 8-eŭra kotizo.

Ni jam rekomendis la **"Gvidilon al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de UN"** kaj la **"Bazan Literaturan Krestomation"** por nia kultura kompetento.

Se vin ravis la paroladoj de nia antaŭa UEA-prezidanto Mark Fettes, indas relegi ilin en **"Ne estas fido nur. Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010-2019"**\*, kiu aperis en 2020 ĉe la eldonejo de la redakcio de "Esperanto", Impeto. Ankaŭ **"Esprimaro"** de Petro Desmet riĉigas nian vortostokon, interalie pri blekoj ("ĉu nur de kvarpieduloj?"). Amuze inter tiuj bestosonoj aperas ĝardenisto (= *satijnvogel*) kiu kantas, sed tiam eblus aldoni samrajte la beban ŭaadon.

Petro citas inverse kiel oni plifortigas esprimon pri sintenado per komparo: majesta kiel cedroj (unu pluralo laŭ biblia teksto!). Sed amuzas "edentita kiel mumio". Petro ruze devigas nin esplori PIV, kie post "Edeno" (li nomas sian "Esprimaron" "Promenoj en Edeno!") troviĝas

mamula familio de sendentuloj, edentatoj au ksenartroj, kiel ekz. mirmekofago, formikmanĝanto. La solvon donas PIV: "etendita kiel mumio". Mumio ja ne nepre estas sendenta, ĉu?

Sed eĉ pli mi profitas de la tradukitaj ekzemploj el la antaŭa PIV (2005 – ĵus aperis tiu de 2020 kun korektoj, sed ne ĉiuj): la **"Vasta Vortaro Nederlanda-Esperanta. – PIVido"** tiom entuziasmigis min, ke mi aĉetis tri ekzemplerojn certe aĉetotajn en la anoncita Jarkunveno. Nu, tion fuŝis la koronaviruso kaj restas du ekzempleroj, kies sesona rabato kaj senigo de sendokosto ŝparus 10 eŭrojn al la ŝatantoj. Tamen la kosto ja estas 51 eŭroj... (por imposto oni pagas 6% kaj por sendokosto 15%...). Ni restu optimismaj kaj eble eĉ pli adaptiĝemaj ol tiu beleta hommanĝanto.

Se paroli pri manĝaĵoj: ĉu ankaŭ vin apetitigas la anoncita tutnova **"Manlibro por la instruado de Esperanto"** de Katalin Kováts, kaj eble la same nove fasonita **"Pomego"**-gramatiko de Bertilo Wennergren?

Bonan digestadon! Sanon kaj forton!  
*Kore, Rob Moerbeek*

\*Vi povas aĉeti la libron "Ne estas fido nur" ĉe <https://katalogo.uea.org/?inf=9821>

## Universala Kongreso 2021

"Oni diras, ke ni estas sinceraj, amikemaj kaj bonkoraj. Ni certe volas bonvenigi vin al nia landeto, kie troveblas montoj, kasteloj, kamparaj parkoj, malgrandaj familiaj farmbienoĵoj kaj ankaŭ grandaj kamparaj domegoj. Ĉi tie oni ĝuas multajn muzikĝenrojn."

El: *Unua Bulteno Belfasto*

Por pli da informoj kaj por aliĝi vidu: <https://uea.org/kongresoj>

Nederlandanoj pagas ĝis la 31a de marto:

- |  |           |
|--|-----------|
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas aligitajn membrojn)              | 240 Eŭroj |
| 2. ne individua membro de UEA  | 300 Eŭroj |
| 3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 120 Eŭroj |
| 4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA               | 180 Eŭroj |





# Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas **Muziko**.

Solve ĉi tiun enigmon per forstrekado de ĉiuj vortoj el la listo sube. La restontaj literoj kune formos frazon.

Kreita de Frank van Hertrooij

Akordo  
Bato  
Bela  
Blovi  
Dirigento  
Disko  
Drumo  
Emocia  
Fajfi  
Fluto  
Gitaro  
Harmonio  
Harpo  
Hobojo  
Kanti  
Klarneto  
Kleo

A	I	M	I	L	A	Ŭ	T	A	O	P	P	D	O	V
K	F	U	O	A	U	S	O	I	K	I	I	A	N	O
O	J	K	K	L	T	T	D	R	A	S	O	I	T	D
R	A	U	I	E	A	O	A	N	K	T	E	E	O	D
D	F	L	Z	B	L	P	O	O	K	K	P	I	O	I
O	O	E	U	E	I	T	N	A	K	M	N	N	O	R
M	C	L	M	D	O	O	T	L	U	O	O	V	M	I
B	N	O	A	I	F	R	A	R	M	T	I	L	T	G
L	A	A	G	O	O	R	T	R	O	O	M	O	I	E
O	N	K	L	I	N	P	A	S	L	M	J	O	R	N
V	O	I	A	E	T	H	R	O	E	O	B	T	N	T
I	S	T	T	O	J	A	N	A	B	K	N	O	N	O
K	N	O	E	L	K	O	R	O	H	U	R	N	N	R
P	O	F	L	U	T	O	H	O	O	O	L	O	S	O
R	K	V	I	A	I	C	O	M	E	O	M	U	R	D

Konsonanco  
Ksilofono  
Laŭta  
Melodio  
Muziko  
Noto  
Orkestro  
Piano  
Rapida  
Ritmo  
Solo  
Takto  
Tono  
Trombono  
Trumpeto  
Ukulelo  
Violono

Solve de la lasta vortserĉenigmo:

"Ni rigardos la stelojn ĝis la koloj doloras."



## Sylvia Witteman leert Esperanto

In het novembernummer van *Onze Taal* schreef columniste Sylvia Witteman een column. Ze is dolenthousiast over het leren van talen in Duolingo en steekt de loftrumpet over het Esperanto. Hierbij een deel van haar column. Jos Wichmann heeft haar een email gestuurd. Wellicht reageert ze daar nog op. Rob Groeneveld reflecteert op haar column en beschrijft hoe Duolingo steeds groter wordt.

### Fragment uit de column

Bron: *Onze Taal*, november 2020

## "Esperanto"

[...]

"Gisteren begon ik aan een nieuwe uitdaging. Esperanto! Een vergeten, negentiende-eeuwse, geconstrueerde wereldtaal waar al geruime tijd een zweem van belachelijkheid omheen hangt. Waarom zou je een neptaal leren als iedereen toch Engels spreekt?

Minzaam glimlachend startte ik Duolingo's Esperanto-app. 'Bonan tagon!' Dat was makkelijk. Al binnen tien minuten was ik bij 'Pardonu, mi estas komencanto.' Zelf voelde ik me inmiddels zeker geen beginneling meer. Instinctief begreep ik alle woorden; ik racete door de leerstof als een heet mes door de boter. Wat een geniale taal! Die simpele grammatica, die woorden die als legobouwseltjes zijn samengesteld uit een stam met verschillende achtervoegsels! Als een man viro is, wat is er dan logischer dan een vrouw virino noemen? Als sana zeer terecht 'gezond' betekent, dan is malsana toch het enige logische woord voor 'ziek'?

Al twee dagen ben ik niet van Duolingo weg te slaan."

[...]

### Email naar Sylvia Witteman

*Datum: Zondag 15 november 2020 11:39*

Geachte redactie,  
Ik hoop dat u de reactie op de column van Sylvia Witteman wilt plaatsen in uw tijdschrift.  
*Jos Wichmann, Nijmegen.*

Beste Sylvia,

Met veel belangstelling heb ik jouw column gelezen, waarin je vooroordelen opsomt, die Esperantisten dikwijls te horen krijgen. Iedereen spreekt Engels, hoor je dan inderdaad. Ik zeg dan altijd: niet iedereen, veel mensen spreken Engels. Engels heeft voor mij even veel waarde als andere talen. Daarom vind ik het beter om Esperanto te gebruiken als internationale taal. En ik ben niet de enige die er zo over denkt. Ik hoor ieder jaar rond 26 juli, de datum dat in 1887 het eerste Esperanto leerboek verscheen, op de radio dat men verwachtte dat 100 jaar later iedereen die taal zou spreken. Weer dat iedereen, er bestaat geen enkele taal die iedereen spreekt. Ik weet niet of iemand dat inderdaad voorspeld heeft; ik doe dergelijke voorspellingen niet. We moeten gewoon afwachten. Ik ben in ieder geval blij dat je verder dan de bestaande vooroordelen kijkt en je in het Esperanto bent gaan verdiepen. Er zijn in ieder geval diverse mogelijkheden om het geleerde te gebruiken: boeken en tijdschriften lezen, radio-uitzending uit verschillende landen op het internet beluisteren en niet te vergeten het corresponderen.

*Jos Wichmann Nijmegen.*

*De redactie van Onze Taal heeft laten weten dat het door de grote hoeveelheid redactiepost die ze ontvangen niet mogelijk is iedere brief/e-mail persoonlijk te beantwoorden. Alleen als ze besluit de reactie te plaatsen neemt ze contact op. Zo niet, dan sturen ze deze door naar Sylvia Witteman; wellicht antwoordt zij dan nog persoonlijk.*

# Sylvia Witteman kaj Duolingo

*De Rob Groeneveld*

Sylvia Witteman, verkistino kiu publikigas kolumnojn en De Volkskrant kaj en la revuo Onze taal, verkis kolumnojn pri Esperanto kaj pri Duolingo. Lastatempe ŝi verkis kolumnon pri tio ke ŝi lernas Esperanton per Duolingo. Duolingo estas interreta programo en kiu oni povas lerni multajn lingvojn. Oni lernas novan lingvon per lingvo kiun oni jam scipovas bone, ofte la gepatra lingvo. Enestas en Duolingo multaj lerneblaj lingvoj, sed ne tre multe da lingvoj per kiuj oni povas lerni. Plej multe la angla lingvo estas uzata por lerni deziratan lingvon. Esperanto estas unu el la lerneblaj lingvoj kiun oni povas lerni per la angla lingvo. Mi supozas ke Nederlandanoj kiuj lernas Esperanton per Duolingo uzas la anglan lingvon.

Antaŭ kelkaj jaroj Sylvia Witteman verkis kolumnon en kiu ŝi diris ke Esperanto 'altgrade malsukcesis'. Sed nun ŝi provis lerni Esperanton per Duolingo, post kelkaj aliaj lingvoj. Komence ŝi diris en la kolumno en Onze Taal ke Esperanto estas iom ridinda, sed poste ŝi nomas la lingvon 'genia' pro la simpla gramatiko kaj la logike uzataj radikoj kun sufiksoj.

En Duolingo la lernanto ekzercas sin per frazoj (tradukado tien kaj reen, kompletigo, diktado ktp), frazoj kiuj foje estas utilaj kaj verecaj, foje nepraktikaj kaj iomete ridindaj. La gramatikaj klarigoj estas koncizaj. Esperanto tre taŭgas por tia interreta lernado pro la klara strukturo kaj efika vortfarado. Tamen oni bezonus pli detalan lernolibron por bone lerni la gramatikon. Sylvia Witteman verkis ankoraŭ trian kolumnon en kiu ŝi rakontis ke ŝi lernis kelkajn lecionojn de la hispana lingvo kaj provis kompreni hispanlingvan patron kiu parolis al sia filino. Kvankam ŝi jam konas plurajn ridindajn frazojn en la hispana lingvo, ŝi tamen nenion komprenis en tia rapida kaj flua parolado. Ne mirinde. Oni devas multe labori por ekregi alian lingvon. Duolingo estas unu el pluraj rimedoj por tia lernado.

## **Duolingo daŭre evoluas kaj pligrandiĝas**

Ekzistas pluraj fazoj por la stato de iu kurso en Duolingo. Ĉiam temas pri kurso en unu lingvo por



lerni alian lingvon. Ekzemple, lerni Esperanton per la angla lingvo. La nuna stato (la 28-an de novembro 2020) de Esperanto estas:

Fazo 1 - ankoraŭ ne publikigita:

- Esperanto per la ĉina lingvo (kvar kontribuantoj)

Fazo 2 - duonpreta beto-versio, farebla kiel provo:

- Esperanto per la (brazila) portugala lingvo:

  - 214.000 lernantoj

- Esperanto per la franca lingvo: 38.600 lernantoj

Fazo 3 – plialtigita de la beto-versio, normale farebla:

- Esperanto per la angla lingvo: 288.000 lernantoj

- Esperanto per la hispana lingvo: 220.000 lernantoj

Do entute 760.600 partoprenantoj lernas Esperanton.

Se oni komparas, la klingonan lingvon (fantazia lingvo de ekstertera civilizacio) en Fazo 2 lernas 299.000, do pli da homoj ol tiuj kiuj lernas Esperanton per la angla lingvo. Kaj la anglan lingvon per la nederlanda lingvo lernas 939.000 partoprenantoj, ankaŭ pli ol la lernantoj de Esperanto per la angla lingvo.

En la virtuala kunveno de Esperanto Nederland mi diris ke Duolingo nur faros kurson de Esperanto per la nederlanda lingvo se sufiĉe da personoj tion petos. Nun montri ke ekzistas alia vojo por realigi tian kurson de Esperanto: oni povas anonci sin por fari tiun kurson kiel volontulo. La postuloj estas, unue, ke oni tre bone sciu ambaŭ lingvojn, do, ĉi-kaze, la nederlandan lingvon kaj Esperanton, due, ke oni konsentu longtempe dediĉi sin al la tasko kaj trie, ke oni estu kunlaborema. Kiu anoncos sin?



## Roterdamo 2020

**Dum la pandemio la verkisto iris en sian kelon kaj trovis lukon neniam viditan antaŭe. Li falis al la jaro 4020 kaj renkontas Fobo-n: malgrandan, senharan, estulon. La verkisto ekscias, ke multaj aferoj ŝanĝiĝis. Eĉ oni ne plu bezonas stratojn...**

Mi: Aŭ stratoj en via laborejo?

Fobo: Mi nun estas en mia laborejo kaj vi estas mia laboratoria rato ha ha ha! Mi: Kial vi ridaĉas tiel stride? Mi abomenas aŭdi tion.

Fobo: Por mezuri vian homecon ha ha ha! Mi: Kaj kio se mi ne demandos plu?

Subite ri malaperis. Mi longe atendis. Vane. Ri ne revenis. Mi enuis kiel en kvaranteno. Mi preferis ke ri revenu kaj parolu kun mi. Mi sentis bezonon al ri. Nenio por homo kiu spertis kvarantenon, aŭ individuan enkarceriĝon, estas pli aĉa ol soleco. Se tiu damna koronaviruso ne venintus, mi nun ne estus sola en ĉi Minesciaskie...

Mi estis en tiaj pensoj ke ri revenis, kun platego da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ho, estis miaj ŝatataj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Fobo: Mi forlasis vin subite por komprenigi al vi ke vi ne kapablos vin liberigi de mi ha ha! Vi bezonas min, rigardu kion mi kunportis al vi.

Mi: Jes, mi vidas ke vi volas delekti min per miaj ŝatataj manĝaĵoj; kuiritaj fazeoloj, varma freŝa pano, olivoleo, citronosuko, pulvora sekmento, ... sed kie estas mia ŝaŝliko?

Fobo: Ha ha ha! Vi besthomoj! Vi devas rekonsciigi ke viandmanĝado estis granda eraro de la homaro.

Mi: Kial?

Fobo: Mi rakontos miton el viaj mitoj. Mi scias ke la persan mitologion vi plej bone konas. Mi ne volas paroli science. Ĉi-foje nur mite. Por montri al vi ke en ĉiuj mitoj, kiuj estas viaj fruhistoriaj konoj, troveblas ke la homoj nature kaj komence ne estis viandmanĝantoj. Ili fariĝis tiaj kaj tio damaĝis ilian evoluon.

Ĉu vi ion scias pri Zahhak?

Mi: Jes, kompreneble. Li estis kruela mita reĝo.

Fobo: Jes, ĝuste. Aĵdahak aŭ Zahhak, en via mitologio, estas trimuzela drako, kiu poste simbolas la filon de Merdas. Merdas estis justa reĝo de araboj kiun la filo (Zahhak) mortigas kaj anstataŭe reĝigas sin mem. Irananoj, kiuj estis malkontentaj pri la reĝado de sia ŝaho (Ĝamŝid) petas ke Zahhak fariĝu la reĝo de Persio. Arimano, en korpo de lerta kuiristo, faris bongustajn viandaĵojn por li kaj rekompence petis kisi liajn ŝultrojn. El la kislukoj kreskis du serpentoj kiuj devis manĝi potage cerbojn de du iranaj junuloj.

Antaŭ la tempo de Zahhak, la homoj estis vegetaranoj. Do vi klare vidas ke la mito diras al vi se vi komencas manĝi viandon, vi devas toleri miljarajn kruelaĵojn kaj krimaĵojn. Zahhak estis la unua viandmanĝanto en via mitologio kaj ĝuste estis li, tiu kiu dum mil jaroj nutris siajn serpentojn per la cerboj de iranaj junuloj.

Mi: Mi sciis pri tio sed ne ke li estis la unua

viandmanĝanto. Fobo: Jes, Arimano lernigis al li.

Mi: Do, ĉu viandmanĝi estas arimana/ satana ago?

Fobo: Jes! Sed Arimano elpensis aliajn trukojn. Li lernigis al homoj trinki alkoholon, fumi tabakon, opion, haŝiŝon, uzi drogojn ktp. por povi elteni la viandon. Tiele, viando kiel manĝo kaj tiuj drogoj, kreis duan naturon por homaro. Vi devojiĝis de la bona evoluo. Tial vi detruis vian vivon kaj preskaŭ detruis la planedon. Ni savis la planedon kaj kelkajn el vi.

Mi: Sed en la naturo, ĉiu-momente, la bestoj manĝas unu la alian, pli forta la malpli fortan.

Fobo: Pli bone diru manĝis! Ne plu nun. Vi estas en alia tempo. Tamen mi komprenas ke vi parolas pri via tempo. Ĝuste, vi pravas. Estis tiele kaj ankoraŭ en aliaj malpli evoluintaj vivoj estas tiele. Tio estas mistero de la vivo. Tia evoluo finfine kreis homon kiel vi, Homus Stultus! Ha ha ha!

Mi: Viaj fortaj, laŭtaj, aĉaj kriridoj vere kolerigas min.

Fobo: Tion mi volas. Mi volas ke vi mem vidu vian bestecon. Mi: Kia besto mi estas?

Fobo: Mi jam diris, Homus Stultus, ha ha ha!

Mi: Kiel?

Fobo: Jam de miloj da jaroj vi vidis ke la superaj bestoj manĝis la malsuperajn. Tio estis procezo de la misforma evoluo. La kreintoj eraris. La unua celo estis ke la naturo, per tia maniero, purigu sin mem de la kadavroj de mortintoj, kaj eĉ iom de la malsanaj aŭ kriplaj. Sed poste, kiel ĉe la homoj, tio ŝanĝiĝis al ĉasado kaj mortigado de eĉ sanaj bestoj. Komenciĝis erara paŝo.

Mi: Sed ĉu tio ne estis parto de la naturo?

Fobo: Vi havis -aŭ en via menso, vi havas- belan dombeston, Gorgi, via hundo, ĉu vi memoras?

Mi: Kompreneble jes.


*Venontfoje la daŭrigo de la rakonto.*

*Rakonto verkita de Saïd Mozaffari*

## Medito sur la meditoserio pri Zamenhof #zamenmed

De Federico Gobbo

Pri avantaĝoj kaj limoj podkastumi en Esperanto hodiaŭ



Kunmeto de la aŭtoro, por la retpaĝo [patreon.com/zamenmed](https://patreon.com/zamenmed)

La daŭrigo de antaŭa numero. >

Parto de mia eksperimento per la meditoserio celis konstati ĉu povas esti subteno al simila kultur-produktaĵo per la **mikrokredita sistemo Patreono, pere de kiu jam aperas aliaj Esperantlingvaj projektoj**. Kaj mi anoncis, ke ĉiuokaze **la meditoj liberiĝos al ĉies ajn umado post tri tagoj ekde la publikigo**. Do, la subteno donas prioritaton al la subtenantoj, ekzemple por doni rimarkojn al mi rekte kaj rapide, kaj ekskluzivan materialon. Mi ege ĝojas, ke mi ricevis subtenon fare de tri homoj, sed mi devas konfesi, post kiam la unua sezono — 123 epizodoj, tio estas 4 monatoj, triono de jaro — finiĝis nun, ke, malgraŭ miaj klopodoj per la sociaj retoj, mi ne kontentas pri la atenta kvanto kiun mi ricevis ĝis nun.

**Verdire, ĉio ĉi ne ricevis preskaŭ ajnan eĥon fare de la Esperanta mondo. Kial? Ĉar nia vilaĝeca mondeto multe pli preferas umbilikumon, ol prezenti sian realaĵon ekstere. Al la ekstero ni abstrakte predikas, al la interno ni konkrete kulturumas.**

La kovrilo de la podkasta versio de la meditoserio en Spotify. Ironie, kiam mi decidis, eĉ kontraŭ la opinio de subtenanto, **podkastigi la epizodojn en pure aŭda formato**, mi atingis multe pli da aŭskultantoj, ĉefe el Usono. Mi min demandas ĉu la dulingva angla-Esperanta prezento de la projekto, kaj la publikigo per neesperantisma dissendservo kiel Patreono, havis efikon en la alproksimigo al "la afero", dirintus Zamenhof. Eble mi neniam scios tion.

Mia sperto post jardeko dum kiam mi instruas Esperanton kaj ĉefe ĝian lingvistikon kaj interlingvistikon ĝenerale en diversaj universitatoj diras al mi la jenon: **ni bezonas interesan materialon pri Esperanto kadre de pli ĝenerala**

**kunteksto** (Esperanto kaj io, ne nur Esperanto kaj Esperanto kaj ankoraŭ Esperanto), aparte post la komencanta fazo. **Kion ni ofertas al progresantoj?** Nia beletro estas aŭ infaneca (kiu ne signifas porinfana, fakte) aŭ dokta, kaj ambaŭflanke ĝi ne taŭgas por la meznivela alproprigo de la lingvo. Kaj ofte progresantoj ektimas uzi vorton spontane antaŭ ol kontroli ĉu ĝi ĉeestas en la vortaro, pro la firmaj atakoj de la lingvopolicianoj kiuj svarmas en Esperantujo, kiuj diras kion oni rajtas aŭ ne rajtas diri. Aparte akraj estas la atakoj kiam la vorto ŝajnas veni de perangla prunto — ofte, la origino de la atakata radiko tute ne estas striktasence angla... Lingvopolicianoj puŝis multajn el miaj studentoj for de la praktikokomunumo, kaj mia laboro parte vaniĝis. Ĉiosume: mi ĝojis kunmediti sur la vortoj de Zamenhof kaj mi daŭre ĝojos. Min akompanas kunvojaĝantoj, ne multaj, sed bonegaj, kaj mi ne celas la amasojn per projekto tia. Unu mi volas danki aparte, la pianisto kaj komponisto Paolo Ghiglione, unua el miaj studentoj pri planlingvistiko en la Universitato de Torino, antaŭ iom da jaroj. Li komponis la ĵinglojn vere majstre.

**Sed mi, vidbloganto sen popolo, nun travivas amaretan horon, pro vi, kara sed dormema rondo familia, stranga sekto eta, por uzi la vortigojn de la poeto.**

La unua sezono estas nun entute spektebla per Jutubo, absolute senpage, kaj la dua sezono iom post iom aperos. Mi scivolas pri viaj reagoj. Bonvolu lasi komenton! Pruvu, ke mi eraras.

Tiu ĉi artikolo aperis unue en Medium:

<https://medium.com/@federicogobbo/medito-sur-la-meditoserio-pri-zamenhof-zamenmed-a901545a8c5b>



# Tulipoj



## Planti Esperanto-tulipojn

**Iom da antaŭscio mi havis. Mi sciis ke en la lasta Fenikso aperas artikolo pri la Esperanto-tulipoj. Mi jam kelkfoje provis, sed ĝis nun ne kun granda sukceso. Mi denove provu!**

Mi mendis kelkajn bulbojn jam en oktobro ĉe granda firmao Nur antaŭ tri tagoj mi ricevis ilin. Hieraŭ mi plantis ilin. Kelkajn en ujon, aliajn en la ĝardenon. En la ujo mi uzis normalen ĝardenteron. En la ĝardeno mem mi metis ilin en profundeco de 10 centimetroj.

Mi esperas, ke mi ne tro malfrue plantis ilin. Mi ĵus aŭdis la veterprognozon por la ventontaj tagoj. Estos iom da frosto.

En la printempo mi sciigos al vi ĉu ili bele floras! Ĉu vi enplantis Esperanto-bulbojn?

*Groningen, 1-an de dec. 2020  
Ineke Emmelkamp*

## La krubalo

Jen alia infana libro kiu aperis en Esperanto. Ĉifoje temas pri traduko el la angla lingvo. Fama infana libro 'the Gruffalo' nun haveblas en Esperanto.


Rakontas pri muso, kiu promenas en arbaro kaj lerte superruzas rabobestojn kiuj volas manĝi ĝin.

La infanlibro The Gruffalo estas tradukita en 13 nederlandaj dialektoj.

Havebla ĉe la libroservo de UEA:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9770>

Prezo € 6,90





## Oferto el (mal)nova librokesto

**Novan stokon de Esperanto-libroj mi ricevis. Kelkaj Esperantistoj uzas tiun ĉi tempon por ordigi subtegmentejojn kaj libroŝrankojn.**

Ĉifoje mi ofertas al vi interesajn librojn. Ses librojn el la serio Originala Literaturo:

- Stellan Engholm – La lupu sur kapitolo kaj aliaj noveloj
- Diversaj aŭtoroj – La maŝino kiu kriis ..... Rakontoj pri strangaj fenomenoj
- Eija Salovaara – Kie boacoj vagadas
- Trevor Steele – Aŭstralia Felix
- Ronald Cecil Gates – La vidvino kaj la profesoro
- Sandor J. Bako, Claude Piron – La dorsosako de Panjo Rut'

Iom pli serioza libro estas 'Esperanto in Rubrieken'. 'Hedendaagse' woordjes en uitdrukkingen uit gebieden van het maatschappelijk leven, door W.H.W. van Liempt (1979). Kelkaj esprimoj estas malnovaj. De kachel aanmaken? Nachtspiegel? Veem? Štupara irtapiŝo? Trafikinsulo? Cirkulanta revuaro? Havi papon kiel onklon? Certe vi trovas kelkajn aliajn interesajn vortojn kaj frazojn.

Amuzo per Scienco estas libro verkita de Charles Vivian. Estas libro kun eksperimentoj. Jen libro por amuzi kaj instrui kaj ĝi estas ideala donaco por knaboj kaj knabinoj.


Vi povas elekti tiom da libroj kiom vi deziras. Ne lasu min kun la skatoloj en la koridoro. Mi ne havas subtegmentejon! Vi pagu la sendokostojn. Petu al mi!

Ineke Emmelkamp, [sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)



## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, of het is met het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, het ontmoeten van andere Esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen u op om uw ervaringen met ons te delen. Uw verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur u ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg met u. Wanneer u wilt, kunnen we ook een interview houden. Neemt u bij langere teksten eerst contact met ons op. Stuur uw bijdrage op naar: [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl).







# 19 - 21 november 2021

## Esperanto Studieweekend

**Voor wie** Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of jouw Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen

**Wanneer** Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 19 t/m zondag 21 november 2021.

**Waar** Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.


De **kosten** voor dit studieweekend bedragen € 85,- pp. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-vereniging betalen € 75,- pp.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen.

De **deelnemersbijdrage** van deze bijeenkomst is laag. We willen iedereen een kans geven om deel te nemen. Wil je een extra financiële bijdrage leveren, geef dan aan op het aanmeldingsformulier met wat voor bedrag je de bijeenkomst wil steunen. Elke bijdrage is welkom.

**Meer informatie** en het aanmeldingsformulier op de website van Esperanto Nederland staan op de website <https://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend/studieweekend.php>

## Covid-19

In 2020 hadden we twee studieweekenden en een studiemiddag gepland. Helaas hebben we deze moeten annuleren in verband met Covid-19. Ook het geplande weekend van 5-7 maart 2021 hebben we nu toch ook maar geannuleerd. We zien geen mogelijkheid om het op een veilige manier te organiseren. Het gebouw is te klein als we rekening houden met de afstand van 1,5 m. Lesgeven op een veilige afstand is ook lastig. Jammer, maar het is niet anders.



We zullen kijken of we deze leemte kunnen opvullen met virtuele lessen. Volg de aankondigingen op onze website en in Fenikso. Heb je vragen? Neem dan contact met ons op.

Als we de bijeenkomst van november 2021 ook moeten annuleren i.v.m. covid-19, dan betalen we je aanbetaling terug!

*Arjen-Sjoerd, Lilian en Ineke, 6 december 2020*  
[studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl)

PostNL

Port betaald

Port payé

Pays-Bas

Fenikso  
26a Jarkolekto, n-ro 1  
jan. - feb. 2021